

La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William PEACE

sabaton, la 29-an de Junio, 2013 • numero kvar

NE FORGESU!

Ja estos lecionoj kaj en SABATO kaj en DIMANĈO!

Ili okazos matene de 8:30 atm ĝis tagmezo.

Kio okazos hodiaŭ?

★ 7:30 – 8:15 atm
Matenmanĝo

★ 8:30 atm – tagmezo
Lecionoj

★ 12:15 – 1:00 ptm
Tagmanĝo

★ 2 – 5 ptm: Pieda ekskurso al la urbo-
centro de Raleigh


Ni piediros al kelkaj proksimaj
vidindaĵoj:

- Muzeo de natursciencoj
- Muzeo de historio
- La ŝtatodomo de Norda Karolino

★ 5:45 – 6:30 ptm: Vespermanĝo

★ 7:00 – 8:00 ptm: libera por urbesploro

Ni lasos tiun ĉi tempon libera, por ke vi
povu esplori plu en la urbo, se vi volas.
(Kompreneble, vi povos ankaŭ pasigi
la tempon farante hejmtaskojn... ☺)
Se vi restos en la loĝejo dum la ves-
pero, Hoss gvidos kelkajn tabulludojn
kaj kartludojn por vi.



Por la mistera feino

de Prof. Rikardo Salazar CRESPO

*Tuŝanta la animon,
vojaĝas silente,
Imago mistera,
Montranta diinon.*

*Estas feino
kiu min vizitas,
Vojaĝanta aeren
Kvazaŭ ŝtelkiso.*

*Poeziumi por vi
Malfacila afero estas,
T trovi la vortojn ekzaktajn
Atingi versojn necesajn
Neniel por mi estos ebla.*

*Ĉar vi mem estas poemo.
El poemoj: la plej bela.*



Pri la hodiaŭaj ekskursoj en Raleigh

Hodiaŭ, je la 2-a ptm ni promenos
kelkajn minutojn for en la urbon por
esplori proksimajn vidindaĵojn.

**Atentu: kvankam Hoss gvidos vin
tien, li NE gvidos vin hejmen!** Vi estos
libera por esplori laŭ via plaĉo kaj reveni
laŭ via plaĉo. Ni ne havos formalan ves-
peran programon, do se vi preferos
resti en la urbo por vespermanĝi, ankaŭ
tio estos en ordo.

Hoss montros al vi tri lokojn:

La muzeo de natursciencoj havas
plurajn ekspoziciojn pri biologio,

ekologio, geologio, mar-scienco, ks., kaj
specialan portempan ekspozicion kun
robotaj dinosaŭroj!

La **muzeo de historio** havas ekspozi-
ciojn pri la pratempaj indiĝenoj kaj la
alveno de eŭropanoj, la enlanda milito,
la diskriminaciaj leĝoj Jim Crow, kaj
multe pli. Nova portempa ekspozicio
traktas la fifaman skandalon Watergate,
en kiu Richard NIXON eksprezidentiĝis.

Ankaŭ viziteblas la **ŝtatodomo de
Norda Karolino**, tute senpage.

La NASKa Fasko

Redaktejo: Finley 112

<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko estas ĉiutaga ĵurnalo de la
kursaro. Trovu ĝin matene sub via pordo aŭ
en la komuna ĉambro ĉe la unua etaĝo de nia
loĝejo.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon,
foton, ŝercon, bildstrion, leteron, poemon,
am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la
redaktejo en ĉambro 112, aŭ – eĉ pli bone –
sendu ĝin al <nask.esperanto@gmail.com>.

Ĉu vi serĉas poŝtkeston?

La plej proksima poŝtkesto situas ekster la ĉefa enirejo de nia loĝejo, ĉe la kontraŭa flanko de la eta parkejo tie. Se vi bezonas poŝtmarkojn, aĉetu en la librovendejo en la kons-truaĵo Belk, super la manĝejo.




Fariĝu famulo...aŭ helpu al iu famiĝi!

La Fasko estas forumo por vi, karaj legantoj, kie vi povas ekzerci vin en verkado kaj dividi interesajn temojn kun aliaj lernantoj. Mi bonvenigas artikolojn pri viaj vivospertoj kaj ŝatokupoj, viajn poeziaĵojn, enigmojn, ŝercojn, bildstriojn, plendojn, am-leterojn,... aŭ preskaŭ ion ajn.

Portu kontribuaĵojn al la "redaktejo" en ĉambro 112, aŭ (eĉ pli bone) sendu al <nask.esperanto@gmail.com>.

Kaj... se vi estas en la supera kurso, mi kuraĝigas vin helpi al lernantoj en aliaj niveloj verki kaj/aŭ poluri siajn proprajn kontribuojn. Se vi pretas proponi vin kiel volontulon, bonvolu tuj sciigi tion al mi, kaj mi peros tiun informon al tiuj, kiuj serĉas helpon.

—Hoss



El la arĥivoj de Esperanto-USA

En sia kurso hieraŭ, Tonjo parolis iomete pri la usona skismo de la 1950-aj jaroj. UEA forpelis nian tiaman landan organizon (EANA) pro tio, ke estraranoj de EANA akuzis UEA-on pri komunista misinfluo. Jen paĝo el la tiama bulteno de EANA, Amerika Esperantisto (Majo-Junio, 1956).

Leterkesto

La lastatempa diskuto en la supera nivelo pensigis min pri la poemo de Zamenhof en kiu aperas la vortoj "Eĉ guto malgranda konstante frapante traboros la monton granitan."


Mi dirus, "Eĉ guto malgranda, konstante serĉante, trovos fendon finfine." La "fendo" estas en la verda koro de iu, kiu ĝis nun ne konas, ke li/ŝi estas ankoraŭ Esperantisto.

—Julie SPICKLER



★ ★ ★ THE EDITOR'S DESK

ĈU LA ESPERANTISTARO DEVAS TOLERI TION?



Samideano Jakson montras la finan rezulton pri UEA se la nova tendenco daŭros pli longe. Pripensinde tiurilate estas: la kreskanta influo de komunistaj landoj en administrado de UEA; la fakto ke tiuj voĉoj devas voĉdoni laŭ instrukcioj de la kompartioj en iliaj landoj; la stranga fenomeno de multaj voĉoj el Jugoslavujo; la oficiala sendito de UEA kiu samtempe estas sendito de Jugoslavujo por komunista propagando (vidu pagon 78, *Esperanto*, majo 1956); la pena strebado por akordi kun komunistaj landoj kaj celoj; la pena klopodo por forigi kontraŭkomunistojn kaj kontraŭ-komunistajn E-asociojn. Ĉu ni devas toleri tion?



Minjo gvidas grupon en danc-ekzerco post sia prelego pri la metodo de Margaret MORRIS. (Vidu, kiel entuziasme mienas kara Tonjo!)